

ORIENTA STELO

Aprilo 2015



Orienta Esperantista Federacio
Originale fondita en aprilo 1932

Eastern Esperanto Federation
Originally founded in April 1932

Komitato - Kontaktdetaloj

Roy Simmons
Barrie Murphy
Mark Drake
Roy Threadgold

Sekretario 01473461346
Kasisto 01702472193
Komitatano 02085188094
Bultenisto 01371850481

rokeby@globalnet.co.uk
celiaandbarrie@tiscali.co.uk
marko.drejko@gmail.com
roy@boydellsdairy.co.uk

Tiuj kiuj ricevas OS rete, ricevas ĝin pli frue kun koloraj bildoj, kaj samtempe la Federacio ŝparas la poŝtkoston. Ĉiuj gajnas! Nur bezoniĝas informi al Roy T. pri via retadreso.



La 14an de marto kunvenis ĉe Church House, Braintree dek samideanoj. La kunveno estis la jarkunveno, sed estis plena programo sen ĝi, kaj la grupo diskutis lingvajn erojn kun Barrie Murphy, kaj kvizo kun Roy Threadgold antaŭ lunĉo, preparita de Roy Simmons. Post lunĉo okazis la jarkunvenon mem, kaj la diskuto daŭris dum pli ol horo dum ni pripensis la estonton de la federacio. Poste okazis la elekton de oficistoj, kaj la sekvaj estas elektitaj: Prezidanto - vaka, Sekretario - Roy Simmons, Kasisto - Barrie Murphy, Bultenisto - Roy Threadgold, Komitatano - Mark Drake.

Dum la jarkunveno 2016, la venontan marton, ni denove pripensos la estonton de la federacio.

En la foto, de maldekstre, estas Anne Harvey, Joyce Bunting, Brian Bishop, Arturo Prent, Barrie Murphy, Mark Drake, Kimie Markarian, Roy Simmons kaj David Harvey

Originale la intenco estis promeni kaj ludi, sed malebligis tion la longa diskuto dum la jarkunveno. Pro tio, la temanĝo estis nur teo kaj kafo, kaj la lasta ero de la kunveno estis legado de parto de la libro "Mastro de l'Ringo" far J R R Tolkien (Tradukita de William Auld).

**Federacia Kunveno
Quaker Meeting House
Leigh-on-Sea**

Sabaton la 2a de majo

1100 ĝis 1700

Tagmono £5

Ludoj, prelego, baznivela gramatik-instruado,
babilado ktp.

Ĉiuj bonvenaj, el kiu ajn lingvo-nivelo.

**Federation Meeting
Quaker Meeting House
Leigh-on-Sea**

Saturday 2nd May


1100-1700

Day money £5

Games, talk, basic level grammar instruction,
chat etc.

All welcome, whatever your language level.

Quaker House
18 Dundonald Drive
Leigh on Sea
SS9 1NB



Bernice Scott

Estas kun malĝojo ke ni anoncas la morton de Bernice Scott, kiu okazis merkredon la 25an de marto en ŝia domo. Ĉe la funebraĵoj, Anne kaj David Harvey, kaj Roy Threadgold reprezentis Esperantujon. La pastrino menciis esperanton kiel aparte interesa ero de la vivo de Bernice.

Bernice, kune kun ŝia edzo Ron kaj Peter Oliver estris nian federacion dum la 1990aj jaroj, kaj ŝi mem estis prezidanto dum 2004 kaj 2005.

Ron Scott mortis en 1999, sed Bernice daŭris kiel komitatano dum pluraj jaroj. Lastatempe Bernice ne povis vojaĝi al niaj kunvenoj, sed ŝi retenis kontakton kun la federacio, kaj ankaŭ kun la loka grupo en Braintree.

Bernice, samkiel Ron, havis plurajn aliajn interesojn; amo de la kamparo, fremdaj lingvoj, naturismo, literaturo, muziko kaj kanalboatado staris apud esperanto en ŝia animo.

Ni certas, ke ĉiuj sentos la mankon de Bernice kaj rememoros ŝin kiel fervoran esperantistinon.

